

Morfologio kaj sintakso de Esperanto. Paĝo 2 (27.02.2017)

1. Ĉuvaŝoj ne dancas ĉardaŝon en Ĉikago. a b c ĉ d e f g ĝ h ĥ i j ĵ k l m n o p r s ŝ t u ŭ v z
2. Ĝentlemanoj ne trinkas ĝinon en Ĝakarto.
3. Ĵurnalistoj preferas ĵargonon.
4. La ŝerifo rekomendas ŝaŝlikon.
5. Ĥaoso en hospitalo
6. eŭropa jezuito en Jemeno
7. cejlona cunamo

Cirko populariĝas (Artikolo de Saliko el "Monato", www.monato.net)

La interesiĝo pri cirko kiel hobio kreskas en Finnlando. Geknaboj, gejunuloj kaj plenkreskuloj aliĝas al cirko-klubo en diversaj urboj. Ili lernas ne nur akrobatikon kaj klaŭnadon, sed ankaŭ kunlaboradon, respondecon kaj mensan ekvilibron.

En la klubo ne gravas ilia aĝo, sekso, eksteraj aŭ loĝloko. Kore bonvenigante ankaŭ enmigrintojn, la kluboj strebas al multkultureco, egaleco kaj diverseco. La klubanoj lernas krei amuzajn kaj belaspektajn scenojn kaj programerojn, kie kuniĝas ĉiam pli malfaciliĝantaj movoj kun ĉarmaj vestoj kaj kongruaj koloroj kaj muziko. Ili fiere invitas siajn gepatrojn kaj parencojn por vidi la rezultojn. Kompreneble la enirbiletoj kostas iom da mono.

La Cirko-Asocio de Finnlando organizas la trejnadon, tendarojn kaj festivalojn. El sia „ilarobanko” ĝi pruntas laŭeble ilojn por la trejnado kaj prezentoj. La cirko-klubo jam havas 6000 membrojn.

Artikolo de Barry Friedman el "Monato" 2014/1 (www.monato.net)

La usonaj studentoj Scott Weiss kaj Zack Navabi "enkuris" la Guinness-libron pri rekordoj, kiam Weiss surdorse portis sian amikon tra distanco de unu mejlo (1,6 km) en iom malpli ol 12 minutoj. Laŭ la Guinness-regularo, la portato pezu same aŭ iom pli ol la portanto. La duopo studas ĉe Ohio State University, Columbus.

Tri tajloroj (Adaptita teksto)

En unu strato laboris tri tajloroj. Unu el ili instalis apud sia laborejo la reklamon: "La plej bona tajloro de la urbo." La dua tajloro vidis, ke nun pli multaj klientoj vizitas la unuan tajloron. Li instalis apud sia laborejo la reklamon: "La plej bona tajloro en la mondo." Kio restis al la tria tajloro? Li instalis apud sia laborejo la modestan informon: "La plej bona tajloro de la strato."

Tohuvabohuo (Teksto kaj muziko de Nanne Kalma)

La ord' en la vortaro plaĉas al mi.

la sistematiko plenigas min per ĝuo.

Tamen el la vortoj kiujn mi trovis en ĝi

La plej bela estas tohuvabohuo.

Mi agnoskas la gravecon de bona librotend'ad'

Kaj de klara sistemo por kvitancoj kaj fakturoj.

Tamen al mia propra administrad'

Nur aplikiĝas unu vorto: tohuvabohuo.

De miaj ĝardeno kaj domo la stat'

Pravigas nur unu konkludon:

Kiel ajn mi provas konformiĝi al mia deca strat',

Mi ne povas elsaviĝi el tohuvabohuo.